La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-15 n-ro 356

# Kazuo IŜIGURO [石黒 一雄], nobelpremiito pri literaturo 2017



Pollando: 60 000 personoj defiladas alvoke de ekstremdekstro

Alibaba vendis entute je 25 miliardojn USD dum 24 horoj

Lanĉita la tutmonde unua elektra ŝipo de 2000-tuna klaso en Guangzhou

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Pollando: 60 000 personoj defiladas alvoke de ekstremdekstro
*Naciisma marŝado p. 03*

Fortega tertremo mortigis 445 irananojn
*Multaj homoj restas sub ruinoj p. 04*

Lanĉita la tutmonde unua elektra ŝipo de 2000-tuna klaso en Guangzhou
*La bateria ŝargado daŭras du horojn p. 05*

Alibaba vendis entute je 25 miliardojn USD dum 24 horoj
*Tago de Gefraŭloj p. 06*

Kazuo Iŝiguro [石黒 一雄 ], nobelpremiito pri literaturo 2017
*Kiom delikata kaj kunmetita estas la homa ekzisto p. 07*

Hodiaŭe
*Gerhart Hauptmann; Wolf Biermann; kaj Samurajo p. 08*

Itala Geografia Societo
*150-a datreveno p. 09*

# Pollando: 60 000 personoj defiladas alvoke de ekstremdekstro

Pollando pridubis [?] dimanĉe la 12an de novembro, tagon post la festeno pri sendependeco, kiu okazis en grava streĉiteco sur la varsoviaj stratoj. Sabate [11 nov 2017], ĉirkaŭ 60 000 personoj partoprenis naciisman marŝadon, alvoke de ekstremdekstro.




La kolektiĝo okazis kun la oficiala agadvorto «Ni volas Dion!», esprimo, kiu memorigas katolikan kanton komprenatan hodiaŭ kiel forpuŝon de islamo. En julio, la usona prezidento Donald Trump referencis al ĝi dum vizito en Varsovio. La usona prezidento tiam gratulis Pollandon pri ties defendo de la «okcidenta civilizo». Sabaton, unuvoĉe la manifestaciantoj skandis sloganojn instige al perforto kaj ksenofobio, kiel «Pura Pollando, blanka Pollando».

Tiu «*Marsz Niepodległości*», inaŭgurita en 2009, kaj konata kiel la plej grava faŝisma kaj naciisma evento en Eŭropo, kolektis partoprenantojn venintajn el pluraj eŭropaj landoj. La partopreno estis salutata de kelkaj oratoroj, kiuj iniciatis la kolektiĝon. Ili gurdis, ke «la kristana kulturo superas la islaman kulturon».

**Neniu kondamno**

Du kontraŭ-manifestacioj, organizitaj de kontraŭ-faŝismaj grupoj kaj la opoziciaj partioj, okazis samtempe aliflanke de la urbo, por protesti kontraŭ la sinteno pli kaj pli aŭtoritata de la nuna registaro.

Tiu ĉi aliparte ne kondamnis la ekstremdekstran kolektiĝon. «La plej grava estas fideleco al nia patrio, al nia popolo. Tio devus stariĝi super ĉio: super niaj ideologiaj dividoj, niaj malsamaj politikaj opinioj», deklaris la pola prezidento, sen kondamni la dirojn aŭdeblajn dum tiu forta elmontro de la ekstremistoj.

La sola limigo trudita de la pola registaro koncernis la paroladon de Richard Spencer, la usona ĉefo de la blank-supereca movado. Lia interveno estis malpermesita, ĉar tiu viro ne devas aperi publike.

Dum la pasintaj eventoj, interpuŝiĝadoj inter grupoj da manifestaciantoj kaj la polico okazis marĝene de tiu ĉiujara marŝado, organizata la 11an de novembro, dato de reveno al sendependeco, en 1918. Pollando estis dividita dum cent dudek tri jaroj inter tri apudaj potencoj: Rusio, Prusio kaj Aŭstrio.

Neniam Milito Inter Ni



## Fortega tertremo mortigis 445 irananojn

Iranaj amaskomunikiloj raportis lunde [13 nov 2017], ke la nombro de mortintoj en Irano kreskis ĝis 445 je unu tago post kiam fortega tertremo trafis la irana-irakan landliman regionon, kaj multaj homoj restas sub ruinoj.

La raportoj diras, ke almenaŭ 445 homoj estis mortigitaj kaj 7 156 aliaj vunditaj en la 7,3-magnituda tertremo.

Laŭ la Usona Geologia Esploro, la epicentro de la tertremo estis trovita je proksimume 32 kilometroj sude de la urbo *Halabja* en la fora montara regiono de orienta Irako, je ĉirkaŭ 200 kilometroj nordoriente de Bagdado kaj je 400 kilometroj okcidente de Tehrano. La tertremo trafis la regionon je la 9a horo kaj 18 minutoj posttagmeze laŭ loka tempo, kiam multaj homoj estis hejme.

Almenaŭ 14 iranaj provincoj, inkluzive de la ĉefurbo Tehrano, estis influitaj de la tertremo. La plej severe trafitaj regionoj en Irano estis la gubernioj *Qasr-e Shirin* kaj *Sarpol-e Zahab* en la provinco *Kermanshah*, je ĉirkaŭ 20 kilometroj for de la landlimo.

Ĉirkaŭ 30 teamoj de la Ruĝa Kruco el la tuta lando estis senditaj al la regionoj trafitaj de la tertremo, kiuj plejparte spertis severan damaĝon.

Pli ol 20 iranaj vilaĝoj en la provinco Kermanshah estis damaĝitaj kaj la elektra kaj akva liveradoj estas rompitaj. La vojreto en la regiono estas daŭre difektita.

Yu
Ĉina Radio Internacia



# Lanĉita la tutmonde unua elektra ŝipo de 2000-tuna klaso en *Guangzhou*

Posttagmeze de la 12a de novembro en la ŝipfabriko *Longxue*, *Guangzhou*, estis lanĉita la unua tutmonde elektra ŝipo de 2 000-tuna klaso. Konstruita de Guangzhou-a Ŝipfabrika Internacia Kompanio Limigita, la ŝipo longa je 70,5 metroj funkcios por transporti karban brulaĵon, kaj navigos en la Perla Rivero [ 珠江 Zhū Jiāng] kaj aliaj enlandaj akvoj.

Kun ŝargo de 26-tuna litia pilo, la tuta ŝipo havas elektran kapaciton de 2 400 kilovat-horoj, ekvivalente al tiu de 40 aŭtoj *BYD-E6*. Teorie en la kondiĉo de plena elektra kapacito ĝia rapido kalkuliĝas al 12,8 kilometroj/hore (ĉirkaŭ sep nodoj) kaj ĝi povas navigi 80 kilometrojn.

Sen konsumado de brulaĵo dum la tuta vojaĝo, ĝi realigos nulan ellason de karbono, sulfuro kaj partikla materio kies diametro estas maksimume 2,5 mikronoj, kaj pro tio ĝi atingas nivelon III, la plej alta nivelo de verda ŝipo laŭ Regularo pri Verdaj Ŝipoj por Enlandaj Riveroj.

Teorie la bateria ŝargado daŭras du horojn. Ankaŭ por ŝarĝi kaj malŝarĝi la ŝipon estas necesaj du horoj. Sekve oni povas ŝargi la baterion dum la ŝipo estas ŝarĝata kaj malŝarĝata ĉe doko, sen prokrasto al la sekva veturo de la ŝipo.

Ĉar elektra ŝipo ne kaŭzas poluon dum vojaĝo, oni planas uzi tiun teknologion ankaŭ por pasaĝerŝipoj, laborŝipoj kaj alispecaj ŝipoj.

LIU Zijia
El Popola Ĉinio




# *Alibaba* vendis entute je 25 miliardojn USD dum 24 horoj

La 11-an de novembro en Ĉinlando oni festas "Tagon de Gefraŭloj", kiu estas amuza festivalo reliefiganta la fieron esti fraŭlo. La dato 11/11 estis tiurilate elektita ĉar la numero 1 aludas al sola homo.

Lastatempe kadre de tiu festivalo okazadas Tago de retaĉetado, kiu staras inter la plej gravaj tutmonde. Ĉi-foje la grandega ĉina firmao pri retkomerco nome *"Alibaba"* bezonis nur 13 horojn kaj dek minutojn por superi sian propran rekordon pri retvendado (17,8 miliardoj da usonaj dolaroj la 11-an de novembro, pasintjare). Fine post 24 horoj *Alibaba* vendis entute je 25 miliardoj USD.

Mondskale la retaĉetoj en tiu tago superas 2,5-oble tiujn de "*Black Friday*" kaj "*Cyber Monday*" kune.

Tiu estas la 9-a fojo de la evento (Alibaba-a retvendado en la tago de gefraŭloj) kun partopreno de 140 mil firmaoj – 60 mil el ili estas interlandaj – kaj 15 milionoj da varoj.


En la ĉina urbo Ŝanhajo okazis vespera festego, kie gravuloj kiel la aŭstralia aktorino Nicole Kidman instigis la ĉinojn partopreni la datan eventon, kaj prezentis reklamfilmeton de mallonga filmo pri batalartoj, en kiu unuafoje rolas kiel aktoro Jack Ma, kiu estas la ekscentra, riĉega fondinto de *Alibaba.*

Antaŭ kelkaj horoj de la komenco de retvendado, la vicprezidanto de la firmao, Joseph Tsai asertis, ke tiu estas tutmonde la plej grava tago por la komerco, kaj granda evento por la ĉina ekonomio.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Kazuo IŜIGURO [ 石黒 一雄 ], nobelpremiito pri literaturo 2017

Malfacilas esti kandidato. Kutime la favoratoj por la Nobel-premio pri literaturo en la profesiaj vetlistoj gajnas nenion. Alternative oni povas atribui la premion al si mem (aŭ almenaŭ sian fikcian alian "mi"), kiel faris John UPDIKE en *Bech en premego* (*Bech at Bay*). Ankaŭ la nuntempa ada kandidato Haruko MURAKAMI faris jam ironian referencon al la fama premio. En Senkolora *Tazaki Cukuru* kaj liaj jaroj de pilgrimado li notis, ke junaj talentoj povas gajni nur monon, kiam ili ricevas Nobel-premion "aŭ ion alian". Notu bone: junaj talentoj! MURAKAMI jam ne bezonas ajnan konfirmon. Ankaŭ ĉi-jara laŭreato enspezas sufiĉe sen manpremo el Stokholmo. Kaj finfine ili eĉ denove trovis verkiston – mirinde post la lastjaraj ekskursoj al marĝenaj distriktoj de la literaturo.



La elekto de Kazuo IŜIGURO estas laŭ la profesiaj kolegoj ĉe la internaciaj felietonoj iom surpriza, tamen bona. Unu el liaj plej avidaj legantoj estas ĝuste MURAKAMI, kiu ĉe la apero de nova libro de IŜIGURO lasas ĉion por tuj frandi lian novan libron.

IŜIGURO estas ekzemplo por el- kaj enmigrado sur nia tutmondiĝanta tero. Kiel japandevena verkisto en la angla lingvo li mem spertas la "abismon sub nia iluzia sento de konekto de la mondo" kiel asertis la Nobel-komitato. La verkaro de IŜIGURO estas plena de imagitaj hejmlandoj. Ni estas multmaniere en konekto kun la mondo. En sia unua verko *Pala vido de montoj* eĉ Japanio estas tiela imago surbaze de filmoj kaj romanoj. Tamen li ne priskribas Japanion kiel "perditan paradizon".


Probable la plej konata kaj sukcesa romano de IŜIGURO (ankaŭ pro la fama filma adapto) estas *La Restaĵoj de la Tago*. Temas baze pri la tragedio de la homo en la persono de la lojala ĉefservisto STEVENS, kiu klopodas konservi sian dignon, sed tamen perdas sian homecon. STEVENS decidas esti fidela al sia mastro kaj subpremas la ceterajn tavolojn de siaj emocioj. La restaĵoj de la tago tiel temas ankaŭ pri dekondukita idealismo.

IŜIGURO estas por la publiko relative konata premiito, certe ankaŭ pro tio, ke li verkis originalajn kaj adaptitajn scenarojn por famaj filmoj. Li reverkis sian romanon *Neniam forlasu min* kaj por la granda ekrano kaj por la televido. Tial iuj kritikistoj ja asertis, ke li verkas ne veran literaturon, sed eble nur altnivelajn distrajn romanojn. Eble IŜIGURO estas unu el la maloftaj verkistoj, kiuj kapablas verki ambicie kaj populare. *Neniam forlasu min* estas unu el la plej glaciaj malutopioj de la lastaj jaroj. Ni renkontiĝas kun grupo da junuloj, kiuj lernis, ke ili estas tre specialaj kaj aliaj ol la ceteraj homoj. Iom post iom ni komprenas, ke iliaj korpoj funkcias kiel stoko de rezervaj partoj por estontaj transplantadoj. Denove IŜIGURO esploras la homajn kondiĉojn kaj dubojn pri identeco, ĉi-foje en la kostumo de scienc-fikcio.

Esperantoparolantoj ja spertas ĉiutage, ke ni havas diversajn identecojn en diversaj kuntekstoj kaj komunumoj. Ni scias, ke ni estas difinitaj de multaj faktoroj kaj ne de nur unu

faktoro. La mondo fariĝas tro komplikita. Pro tio multaj homoj serĉas simplajn respondojn al malsimplaj demandoj. Tial estas bele, ke la Nobel-komitato elektis verkiston, kiu esploras kiom delikata kaj kunmetita estas la homa ekzisto. Brave, Stokholmo! Gratulon, Kazuo IŜIGURO!

Wolfgang KIRSCHSTEIN
La Balta Ondo



## Gerhart HAUPTMANN

**Gerhart HAUPTMANN [GEhart HAŬPTman] (naskiĝis la 15-an de novembro 1862, mortis la 6-an de junio 1946) estis germana verkisto. En 1912 li gajnis la Premion Nobel pri Literaturo.**

**Vikipedio**

## Wolf BIERMANN



**Wolf BIERMANN [Volf BI:Rman] (naskiĝis la 15-an de novembro 1936 en Hamburgo) estas germana verkisto kaj kantisto.**

**En Esperanto aperis: *Soldat' soldat'*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Samurajo, kun japana glavo.**

**Vikipedio**




# Itala Geografia Societo

La 14-an de novembro la Itala Poŝto eldonis poŝtmarkon por soleni la 150-an datrevenon de la fondo de la “*Società Geografica Italiana*” (Itala Geografia Societo) kiu havas la celon antaŭenigi la geografiajn studojn (fizikajn kaj homajn) kaj protekti la medion.

Ekde 1924, la Societo havas sian sidejon en la deksesjarcenta Palaceto *Mattei*, ĉirkaŭita de la parko de “*Villa Celimontana*” (Vilao, kiu nomiĝas tiel, ĉar ĝi situas sur la Ĉeljo-monteto, tuj apud Koloseo). Elstara membro de la Geografia Societo estis la esperantista profesoro Elio MIGLIORINI (1902-1988).

La 4-an de aŭgusto 1935, la partoprenantoj en la 27-a Universala Kongreso de Esperanto en Romo estis varme akceptitaj de la tiama Guberniestro de Romo, Giuseppe BOTTAI (1890-1959) ĝuste en la ĝardenoj de *Villa Celimontana*. Mi transskribas en teksta formato la raporton pri la akcepta regalo en *Villa Celimontana* (el “Esperanto de UEA” 1935-7/8, p.121):

*Je la 17 h. Ministro BOTTAI, guberniestro de Romo, akceptis la tutan kongresanaron en la belegaj ĝardenoj de la «Villa Celimontana». Ceremonie vestitaj gardistoj kaj servistoj zorgis pri la cirkulado. La komitatanoj, oficialaj reprezentantoj kaj kelkaj eminentuloj estis aparte bonvenigitaj kaj regalitaj je pompa bufeto. Okazis la kutima interŝanĝo de afablaj alparoloj. La 100-persona muzikistaro de la Roma polic-orkestro dume aŭdigis vigle belegan muzikon. La fina ludo de «La Espero» kaŭzis longegan aplaŭdon.*

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo